Sed miras mi, ke la socialisma partio singratulas pro tio, ke ili estas *je la komenco de la fino*, je la *atingo de paco* rilate al terorismo. Por ke estu paco, bezonas esti milito unue. Kaj ne estas milito. Agnoski, ke estas milito inter la Hispana Ŝtato kaj ETAo, aŭ inverse, estas samrangigi tutan civitanaron de Hispanio kaj areton da murdistoj, komunan bonfarton kaj

gangsteran emon al povo sur tuta civitanaro de la vaska lando, ĵuran sistemon kaj perforton.

Mi ŝatas pensi, ke iam miaj kuncivitanoj elvekiĝos el sia turpa malkuraĝo, kiu igis ilin ŝanĝi sian voĉon la 14-an de marto de 2004 pro timo al teroristoj, kaj ili kuraĝos kontraŭstari fiajn teroristojn sur ĉiuj kampoj, tiel, ke ne plu herooj estos bezonataj en tiu ĉi kompatinda lando, Hispanio. Ili tiam estos tiom bravaj kaj sindonaj kiel tiuj ĉi 934 ĵus listigitaj hispanoj, aŭ almenaŭ survoje al iĝi tiel.



Masklismo kaj Universitato

de D-ro Jozefo Ludoviko López Ovída



Inter aliaj estas du ĵokervortoj¹ arde uzataj de homoj je la plej bizaraj kunteksto- jaroj, kvankam la universitata etoso estas unu el la sociaj areoj, kie virino pliigis sian ĉeeston plej rimarkeble kaj grande. Aliflanke, *masklismo* implicas volon de diskriminacio, regemo, humiligo kaj ekspluateco de virino fare de viro, kaj sekvas, ke kiam ne estas tiu volo, oni neniel povas paroli pri masklismo. Kaj okazas, ke estas troigo kvalifiki sisteme kiel masklista ĉiun kritikon al virino, pro la nura kaŭzo, ke ĝi venas de viro.

Unu el tiuj ĵokeraĵoj estas *demokratio*, kaj kiel ekzemplon mi citu tiujn vortojn de Enriko de la Puto, kiam li diras, ke sia *pantalofendo estas demokratia* —por justigi sian pruvitan duseksememon— nekonante, ke la vorto *demokratia* oni nur povas uzi referencante al elekto de reprezentantoj, kaj, sekve, sen konstati, ke sia seksilujo, senrigarde al ties allogo, neniam estis elektata de hispanoj, eĉ en de lia najbaroj, por ia ajn celo. La S-ro de la Puto rajtas prostitui sian fendon ĉiel ajn, sed ne lingvon nian.

La alia ĵokervorto estas *Masklismo*, uzata abunde por kvalifiki kiel kavernula, malsociemula mizogina kontraŭulon. Ekzemplo pri tio estas la surpriza aserto de S-ino Eleno Knjones², kandidato al Rektoreco de Mursjo, dirante, ke *la mursja Unviersitato estas masklista*. Mi diras *surpriza*, ĉar surprizas, ke katedrulino pri psikologio surpriziĝu pri tio, ke unviersitato estu masklista, se ni ĉiuj ja scias, ke ĉiujn etosojn de socio strukturigis de viroj,

Aliflanke, estas tute netolereble, ke S-ino Kinjones aldonu, ke ŝi ne *venkis la balotadon pro ŝia kondiĉo virina*, ĉar tio implicas malestimon al meritoj, konoj kaj programoj de siaj rivaloj. Kaj neniel oni povas akcepti ŝian senkulpigon baze al kliŝo pri *elpreni el la kunteksto*, aŭ *oni interpretis min malbone*, kaj aliaj surprajaĵoj tiel modaj, ĉar unu el al ĉefaj devigoj de ĉiu instruisto estas sinklarigi efike tiel, ke siaj lernantoj kaptu plene la ideojn.

Se S-ino Kinjones komprenis, ke je universitato de Mursjo ekzistas granda volo de masklismo, devintus estu lukto kontraŭmasklisma unu el la eroj de ŝia programo, kaj prezenti ĝin dum la balotanta kampanjo, ĉar diri tion post ŝi malvenkis utilas nur al ŝia hontigo, ĉefe se en ŝia teamo estis plejmulto da viroj.

Se S-ino Kinjones komprenis, ke je universitato de Mursjo ekzistas granda volo de masklismo, devintus estu lukto kontraŭmasklisma unu el la eroj de ŝia programo, kaj prezenti ĝin dum la balotanta kampanjo, ĉar diri tion post ŝi malvenkis utilas nur al ŝia hontigo, ĉefe se en ŝia teamo estis plejmulto da viroj.

¹ ĵokeraĵoj=palabras comodín

² Kinjones=Quiñones

La Gazetoteko Lanti,

historio, kiel oni faras ĝin, kaj kiel oni povas helpi pri ĝi

Se vi, leganto, kutimas la dissendoliston esperantan *Esperanto-en-Hispanio*¹, vi certe jam legis pri tiu gazetoteko, virtuala loko, kie oni trovas interesajn magazinojn de la pasinto kaj pasanto. Mi kreis ĝin je 2003 kun la intenco, ke ĝi enhavu plej eble kiel multe da esperantaj magazinoj. Mi havas sufiĉe da magazinoj, ĉar ne

vane mi estas esperantisto de 1973, sed mi fojfoje perdis numeron, poste mi retrovis ĝin, sed la momenton, kiam mi devis prui al kunparolanto, ke la diskutata evento okazis aŭ estis aprobata de tiu aŭ de ĉi tiu samideano, jam pasis, kaj bedaŭrinde oni konkludis aferojn nekorekte, aŭ simple oni eraris unufoje plu... Ankaŭ, estis forta penso antaŭ mi tio, ke esperantistoj kutime estas homoj, kiuj ne multe da mono havas, kaj ni estas dise tra la mondo, kaj niaj rilatoj ne facilas. Se ni sendas magazinon al samideano, estas eble, ke ni jam perdis ĝin. Ni povas sendi fotokopion, evidente, sed la kosto de la sendo estas same, kaj ankaŭ ekzistas nun pli rapidaj kaj malmultekostaj rimedoj, en la aĝo de komputiloj inter-

rilatitaj de fadenoj, tio estas, retigitaj per interreto.

Mia ideo ŝuldas multe al ideoj de aliaj samideanoj. Unue, mi konsideris la pledon de Nikolao Ŝil, kiu per artikolo en ĉi tiu magazino² iam petis esperantajn magazinojn kaj librojn de malnovaj samideanoj por uzo de novaj kaj renovaj. Due,

mi vidis la retejojn de Don Harlow³ kaj Marteno Wichert⁴, kiuj havigas multe da esperanta materialo al esperantisto, kiu havas retaliron. Se oni deziras vidi libron en Esperanto tute senkoste, oni vizitu vi tiujn retejojn. Don Harlow kaj Marteno Wichert inkluzivis en sia retejo multe da literaturaj juveloj mondaj, kaj se oni deziras konsulti tute profesion kaj lastvortan gramatikon de Esperanto, mi konsilas viziti la retejojn de Bertilo Wennergen⁵, kiu enhavas lian bonegan kaj klaregan *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, mal-longe PMEG, kiu jam famiĝis inter esperantistoj laŭ la tuta mondo. Oni ankaŭ povas trovi ĝin en surpapera versio, je la



¹ Vidu je <http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto-en-hispanio/>

² Vidu *Kajeroj el la Sudo* n-ro 41-an, paĝon 18-an.

³ <http://www.webcom.com/~donh/don/don.html>

⁴ <http://www.math.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/>

⁵ <http://bertilow.com/pmeg/>

kutimaj librovendejoj esperantaj, se vere ne senpage, kiel tra la retejo.

Trie, sed ne malpli grave, estas la simpla fakto, ke mi mem publikigas esperantan magazinon de 1996. La pasintan numeron mi ĵus redaktis ĝin de antaŭ dek jaroj. Mi jam havas ideon pri tio, kio estas publikigi esperantan magazinon, ne ĉiam akurate, sed ĉiam aperante kvar fojojn jare. Tio havas multe da problemoj kaj laboro, kaj neniu el ili du ĉiam bone komprenata de aliaj homoj, eĉ se esperantistaj. Senrigardante la atakojn politikajn, la afero ja enhavas multe da laboro, kaj tiu konsidero igis min pensi, ke aliaj redaktoroj ankaŭ trovis multe da problemoj kaj laboro por publikigi siajn magazinojn. Kaj ne per tiom favoraj kondiĉoj, kiujn mi havas nun, je la 21-a jarcento, kun komputiloj kaj aliaj maŝinoj, kiuj malpezigas multe tiun ĉi taskon. Ili senlace laborante, ĉu kun helpo de amikoj kaj aliaj samideanoj, ĉu tute solaj, produktis paperaĵojn, kiujn ili sendis eble al deko, al centoj aŭ al miloj da abonantoj. Post kelkaj jaroj, la eldono de la koncerna magazino haltis, pro iaj ajn kialoj, kaj la sola atestoj, ke ili ekzistis, kuŝis provizore sur la bretoj de kelkaj homoj dise laŭ la mondo. Sed tiuj homoj ne ĉiam kunhavis tiujn magazinojn, bedaŭrinde en multaj kazoj pro tio, ke ili ne havis iun ajn kunhavi ilin: je la morto de esperantistoj, vidvinoj aŭ georfoj vendis la librojn kaj magazinojn de la mortintoj, aŭ plej ofte, metis ilin en rubujon. La afero estas bedaŭrinda ne nur pro tio, ke neniu alia homo profitos el tiuj publikaĵoj, kiel plendis Nikolao, sed estas eĉ pli dolora la fakto, ke tiel malaperis magazinojn, kiujn oni faris per multe da laboro kaj peno. Kiom da ili jam malaperis, kvazaŭ ili neniam ekzistintus? La historio

de Esperanto, bedaŭrinde, devas pasi sen ili.

Nu, ni ne povas rehavi ilin, sed ankoraŭ ni povas savi tiujn magazinojn, kiuj ankoraŭ kuŝas sur bretoj niaj, kiuj eble estas unikaj numeroj en la mondo. Per aldono al la **Gazetoteko Lanti**, ni povas venki Tanaton⁶, kaj eternigi ilin, vivigi ilin por ĉiam.


Sed ni ne volas perdi ilin, kaj oni jam scias, ke se oni sendas magazinon al esperantisto, ĉefe se ni neniam vidis lin antaŭe, ni riskas perdi ĝin. Nu, mi solene promesas, ke ĉiun magazinon senditan al mi por inkluzivigo en la **Gazetoteko Lanti**, mi resendos plej eble kiel rapide. Sed se oni ne deziras havi riskon, oni povas sendi al mi fotokopion de la magazino. Laŭ la teknologio, kiun mi uzas por kompili la koncernajn dokumentojn, se la fotokopio estas bona kaj klara, ja sufiĉas. Tiukaze mi forĵetos ĝin kiam mi jam uzis ĝin. Sed estas alia afero, kiun oni povas fari, kiu estas pli rapida, pli malmultekosta, kaj pli simpla por mi, la zorganto de la **Gazetoteko Lanti**: vi mem pretigu la dokumenton, kaj sendu al mi per interreto, aŭ per *helika* poŝto per diskedo. Mi klarigas la procedon en la venontaj paragrafoj.

Kiel fari virtualan magazinon

Unue oni devas skani ĝin, paĝon post paĝo.

Skaniĵo estas aparato, kiu tradukas imagon en serion da nombroj. Tiun serion oni povas registri en komputilon per *dosiero*, alidirite *arĥivo*, kiu estas, baze, aro da konitaĵoj —ĉikaze nombroj— registritaj sub aparta kaj unika nomo. Ekzistas sufiĉe diversa aro da eblaj

⁶ Laŭ pragrekoj, **Tanatos** aŭ **Tanato** estis dio de morto.



manieroj organizi la nombroj en la dosiero, kaj pro tio mi akceptis kelkajn konvenciojn, kiujn mi priskribas sekve.

Kvankam mi laboras de kelkaj jaroj per senpaga operativa sistemo Linukso, mi ankoraŭ ne migris tute en tiun mirindan sistemon, kaj mi uzas Vindozon por tiu ĉi tasko. Do, mi priskribos tion, kion mi faras, esperante, ke kelkaj legantoj ankaŭ povos fari same, kaj tiel ili povas kunlabori en la **Gazetoteko Lanti**.

Aldone al Vindozo, mi uzas la programojn *Paint Shop Pro*-n kaj *Acrobat*-on. Mi ne uzas *Photoshop*-on, eĉ se oni ankaŭ povus uzi ĝin por nia celo, pro du kialoj: unue, ĝi estas multe pli kosta, kaj due, PSP estas multe pli rapida, kaj havas la funkciojn, kiujn mi bezonas por mia celo. Oni vidas starton de la programo supre en tiu ĉi paĝo. Certe oni povas uzi aliajn programojn, sed mi esperas, ke priskribinte mian procedon, la leganto povos apliki ĝin al sia programo.


Skonado

Unue, ni metu la magazinon en la skanilon, kaj skanu la unuan paĝon. Oni zorgu, ke la rezolucio estu 300 pikseloj per colo, kaj la imago estu nur dukolora. Oni

devas instrui la skanilon uzi tekstan skanadon, eble, aŭ rekte dukoloran. Eĉ se oni povas uzi pli da koloroj, kaj poste oni ja povas traduki la imagon al nur du koloroj, la granda ol se dekomence oni uzis du koloran skanadon.

Povas okazi, ke la imago estas klinita iomete. Per PSP oni povas turnigi ĝin dekstre aŭ maldekstre per gradoj, dekonjoj da grado, aŭ eĉ centonoj da grado, kion oni vere neniam bezonas. Gravus, ke la paĝoj estu vertikalaj.


Sekvanta paŝo estas, ke ĉiuj paĝoj en la sama magazino havu la saman grandon. PSP povas pligrandigi aŭ malpligrandigi la paĝon al antaŭdifinita granda. En nia ekzemplo, la paĝon de **Espero Katolika** estis antaŭdifinita je 1800 pikseloj per colo larĝe kaj 2623 alte. Tio signifas, ke ĉiujn paĝojn oni modifos al tiuj dimensiojn, por ke kiam oni kompilas la finan dokumenton, oni povos legi ĝin pli komforte.



Kaj la lasta paŝo estas konservi la imagon en nian komputilon. Oni uzu la formaton TIFn, ĉar mi trovis, ke ĝi estas plej malgranda dosiero, eĉ malpli granda ol per formato JPGo. Tiu ĉi lasta estas la plej bona elekto, tamen, se la paĝo estas kolora. Sed blankonigraj paĝoj estas pli malgrandaj per TIF ol per JPG. Se oni uzas Linukson por skani, oni elekti subformaton LZWn. Tamen, mia sperto pruvis al mi, ke per Linukso la dosieroj estas pli grandaj ol per Vindozo. Mi bedaŭras, ke mia nekono pri komputilarto malebligas min klarigi pri tio.

Nu, ni nombrigu la dosierojn per koheraj nomoj: ek312-49.tif en nia ekzemplo, signifas, ke estas paĝo de espero katolika, numero 312, kaj paĝo 49-a. Kompreneble, oni povas uzi alian sistemon nombrigi la paĝojn, kondiĉe ke estu klare tio, kiun paĝon oni metu antaŭ aŭ post la aliaj.


Nu, se oni jam havas la tutan paĝaron de magazino, oni devas kompili ilin en unusolan dosieron. Mi faras tion per programo Acrobat, de Adobe. Bedaŭrinde, ĝi ne estas senpaga, kaj fakte ĝi estas



multekosta programo. Estas aliaj eblecoj, kiujn mi diskutos je la lasta parto de ĉi tiu artikolo.

Kompilado

Kiel dirite, mi uzas la programon Acrobat. Se oni uzas Vindozon, oni povas havi la senpagan legilon **Acrobat Reader** (ĉiam uzu la lastan version, kiu nun estas la 7-a) el retadreso <http://www.adobe.com>⁷.



Per tiu programo, Acrobat, mi prenas la tutajn dosierojn, kiujn mi ĵus kreis per PSP, kaj ordigas ilin, laŭ la paĝnombro, kiun mi zorgis inkluzivi en la paĝo elektronika. Post kelke da tempo, mi kreas elektronikan magazinon.

Se vi faris tiun ĉi procezon, vi povas sendi la dokumenton per aldonajo al ret-mesaĝo al mia retadreso esperato@gmail.com. Se ĝi havas malpli ol unu megabajtan grandon, vi povos sendi al mia kutima retadreso, jesuo@ono.com. Sed mi preferas, ke vi sendu al esperato@gmail.com, ĉar tiu ĉi ne havas problemon pri grandado de mesaĝo aŭ nombro da ili, do via mesaĝo nepre atingos min.

Sed se vi ne povis krei la pdf-n dosieron, ĉar vi ne havas Acrobat-n aŭ vi ne volas ⁷Tie oni ankaŭ povas trovi versiojn senpagajn de tiu programo por Linuko kaj MAC-OS.

fari tiun paŝon, vi povas sendi la dosierojn en formato TIF rekte al mi. Mi volonte faros la pdf-igon en malmulte da tempo.

Enretigo

Tuj kiam mi jam havas la virtualan dokumenton, mi enretigas ĝin per programo AceFTP, sed mi antaŭe faris tion per FTP_WS, kiu estis senpaga por studentoj kaj instruistoj. Bedaŭrinde, ĝi iom eksmodiĝis, kaj la aŭtoro ne plu donacas la novajn versiojn. Tial, ni aĉetis multe malpli koston AceFTP-on. Sed vi ne havos tiun problemon, ĉar **mi mem enretigos** tion, kion vi sendos al mi. Ankaŭ, mi devas aktualigi la indeksan paĝon de la gazetoteko, per kodo html, por ke oni facile trovu la dokumentojn en la interreta ĝangalo.

Pli malmultekosta eblecoj

Sed ekzistas multe malpli kosta alternativo al Acrobat: OpenOfficeWriter⁷ estas programo origine de Linukso, sed kiun oni povas ankaŭ trovi por Vindozo. Per ĝi oni

povas krei tekstajn dokumentojn, same kiel Word —eĉ pli bone—, kaj aldone oni povas registri la dokumenton kiel pdf formato rekte. Sed unue oni kreu blankan dokumenton, kaj en ĝin enportu la imagojn en TIF formato, kiujn oni kreis per skanilo. Poste, oni konservu rekte en pdf formato, kaj jen estas dokumento por nia retejo. Vi devas nur sendi ĝin al mi.

Lasta pripenso

La celo de tiu ĉi ekspliko venas el la penso, ke eĉ se mi mem jam enretigis multe da magazinoj, tiu ĉi laboro estas tro granda por nur unu homo. Mi povas esti la inicianto, sed mi nepre bezonas la helpon de multe da homoj. Se **multaj faras nur ion** da laboro, la laboro **multas**. Se **nur unu** homo faras multe da laboro, la **laboro malmultas**. Ni ĉiuj kune povas donaci grandan regalon al venontaj generacioj de esperantistoj. Nur unu homo povas nur montri la vojon, kiun oni povas sekvi cele al kunhavi nian kulturon pere de periodaĵoj, kiujn oni faris iam per multe da laboro, iluzio kaj laboro. Ni ne konsentu, ke tio perdiĝos!



Build contributed in collaboration with the community
by Sun Microsystems, Inc. For credits, see:
<http://www.openoffice.org/welcome/credits.html>

⁷Trovebla ĉe <http://www.openoffice.org>

La Faraono, Ĉapitro 18a (fino)

De tiu ĉi alteco la faraono ne rimarkas la homojn maljuste kondamnitajn aŭ rekompencitajn, sed li vidas amason da kolektiĝintaj senokupaj laboristoj. Li ne vidas la soldatojn en la drinkejo, sed li ekkonas, ĉu ia regimento faras ekzercojn. Li ne vidas, kion kuiras por la tagmanĝo iu kamparano aŭ urbano, sed rimarkas brulon komencaĝantan en la kvartalo. Ĉi tiu ŝtata organizo diris Herhor viviĝante estas nia gloro kaj potenco. Kaj kiam Snofru, unu el la faraonoj de la unua dinastio, demandis pastron, kian monumenton li devas konstrui por si, ĉi tiu respondis:

—Desegnu, sinjoro, sur la tero kvadraton kaj metu sur ĝi ses milionojn da ŝtonoj ili reprezentos la popolon. Sur tiu ĉi tavolo metu sesdek mil ĉirkaŭhakitajn ŝtonojn tio estos viaj malsuperaj oficistoj. Sur tio metu ses mil poluritajn ŝtonojn tio estos superaj oficistoj. Sur tio starigu sesdek ŝtonojn ornamitajn per skulptaĵoj tio estos viaj plej proksimaj konsilistoj kaj militestroj, kaj sur la supro metu unu solan ŝtonon kun ora bildo de l' suno kaj tio estos vi mem.

Tiel faris la faraono Snofru. Tiamaniere leviĝis la plej antikva ŝtupa piramido la plej evidenta bildo de nia regno kaj naskis ĉiujn aliajn. Ili estas konstruaĵoj nemoveblaj, de kies supro oni vidas la ekstremojn de l' mondo, kaj kiuj estos miro de plej malproksimaj generacioj.

Sur tia organizo estas bazita nia supereco je la najbaroj. Etiopianoj estis same multenombraj kiel ni, sed ilia reĝo mem zorgis pri sia brutaro, mem bastonis siajn regnantojn, ne konis ilian nombron, ne sciis kolekti ilin, kiam venis niaj armeoj. Ne ekzistis tie unu sola Etiopio, sed granda amaso de neordigitaj homoj, kaj tial hodiaŭ ili estas niaj vasaloj.

La libia princo mem juĝas ĉiun aferon precipe inter riĉaj homoj kaj oferas al ili tiom da tempo,

ke li apenaŭ povas rigardi post sin. Kaj tial ĉe lia flanko naskiĝas tutaj bandoj da rabistoj, kiujn ni ekstermas.

Sciu ankaŭ tion, sinjoro, ke se Fenicio havus unu komunan estron, kiu sciis, kio okazas en ĉiuj urboj kaj komandus en ili, ĉi tiu lando ne pagus al ni eĉ unu utenon da tributo. Kaj kia feliĉo por ni, ke la reĝoj de Ninivo kaj Babelo havas nur unu ministron kaj estas tiel lacaj de la alfluo de l' aferoj, kiel vi hodiaŭ! Ili volas mem ĉion vidi, juĝi kaj ordoni kaj implikis la aferojn de l' ŝtato por cent jaroj. Sed se troviĝus iu malnobla egipta skribisto, kiu irus tien klarigi al la reĝoj iliajn erarojn en la regado kaj aranĝus nian oficistan hierarĥion, nian piramidon, post dekelko da jaroj Judeo kaj Fenicio falus en la manojn de Asirianoj kaj post kelkdeko da jaroj de l' oriento kaj nordo, tra la maro kaj tra la tero tombus sur nin potencaj armeoj, kiujn ni eble ne povus kontraŭstari.

—Ni do hodiaŭ ataku ilin, profitante ilian malordon ekkriis la princo.

—Ni ankoraŭ ne resaniĝis post niaj antaŭaj venkoj—, respondis Herhor malvarme kaj komencis adiaŭi Ramzeson.

—Ĉu la venkoj malfortigis nin? eksplodis la kronprinco. Ĉu ni ne alportis trezorojn?...

—Kaj ĉu ne malboniĝas la hakilo, per kiu ni dehakas la arbojn?... demandis Herhor kaj foriris.

La princo komprenis, ke la ministro deziras pacon por ĉiu prezo, kvankam li mem estas ĉefestro de la armeo.

—Ni vidos!... murmuretis li al si mem.

Kelke da tagoj antaŭ sia forveturo Ramzes estis alvokita al lia sankteco. La faraono sidis sur apogseĝo en marmora salono, kie estis neniuj, kaj kies kvar pordojn gardis nubiaj soldatoj.

Apud la reĝa seĝo staris tabureto por la princo kaj malgranda tablo ŝarĝita de dokumentoj, skribitaj sur papiruso. Sur la muroj estis koloraj skulptaĵoj, prezentantaj la terkulturajn okupojn, kaj en la anguloj de l' salono rigidaj statuoj de Oziriso kun melankolia rideto sur la lipoj.

Kiam laŭ ordono de l' patro la princo sidiĝis, lia sankteco diris:

—Vi havas ĉi tie, mia filo, viajn dokumentojn, kiel generalo kaj vic-reĝo. Ŝajnas, ke la unuaj tagoj de l' regado laciĝis vin?...

—En la servado de via sankteco mi trovos fortojn.

—Flatulo!... ekridetis la reĝo. Memoru, ke mi ne volas, ke vi trolacigu vin... Amuziĝu, la juneco bezonas distraĵojn. Sed tio ne signifas, ke vi ne havas gravajn aferojn por plenumi.

—Mi estas preta.

—Unue... unue mi malkovros al vi miajn ĉagrenojn. Nia trezorejo havas malbonan aspekton: la alfluo de la impostoj estas pli kaj pli malgranda, precipe el Malsupra Egipto, kaj la elspezoj kreskas... — La monarĥo ekmeditis.

—Ĉi tiuj virinoj... ĉi tiuj virinoj, Ramzes, englutas la riĉaĵojn ne nur de simplaj homoj, sed ankaŭ miajn. Mi havas kelkcenton da ili, kaj ĉiu volas posedi kiel eble plej multe da ĉambrestinoj, modistinoj, frizistoj, sklavoj por la portiloj, sklavoj por la ĉambroj, ĉevaloj, remistoj, eĉ favoratoj kaj infanoj... La malgrandaj infanoj!... Kiam mi revenis de Teboj, unu el tiuj ĉi sinjorinoj, kiun mi eĉ ne memoras, baris al mi la vojon kaj montrante fortan trijaran knabon, postulis, ke mi destinu por li bienon, ĉar tio estas, kiel ŝi diris, mia filo... Trijara filo, ĉu vi komprenas?... Kompreneble mi ne povis disputi kun virino, precipe pri tiel delikata afero. Sed pli facile estas al nobelulo esti ĝentila, ol trovi monon por ĉiu simila fantazio...

Li balancis la kapon kaj ripozinte iom daŭrigis:

—Dume miaj enspezoj, de la komenco de l' regado, malgrandiĝis ĝis duono, precipe en Malsupra Egipto. Mi demandas: kion tio signifas?... Oni respondas: la popolo malriĉiĝis, la nombro de la loĝantoj malgrandiĝis, la maro okupis parton de teroj norde, kaj la dezerto oriente, estis kelke da senfruktaj jaroj, unuvorte katastrofo post katastrofo, kaj la trezorejo estas pli kaj pli malprofunda...

Mi do petas vin: esploru kaj klarigu al mi ĉi tiun aferon. Ĉirkaŭrigardu, koniĝu kun homoj bone informitaj kaj verdiraj kaj formu el ili esploran komitaton. Kaj kiam ili komencos prezenti raportojn, ne tro konfidu al la papiruso, sed mem kontrolu tion aŭ alion. Mi aŭdas, ke vi havas la okulon de militestro, kaj se estas tiel, unu rigardo instruos vin, kia grado estas precizaj la raportoj de la membroj de via komitato.

Sed ne rapidu formi definitive vian opinion kaj antaŭ ĉio ne publikigu ĝin. Enskribu ĉiun gravan konkludon, kiu pasos tra via kapo, kaj post kelke da tagoj esploru la aferon kaj ree faru notojn. Tio instruos al vi singardemon en la juĝo kaj justan komprenon de l' aferoj.

—Estos, kiel ordonas via sankteco— intermetis la princo.

—La dua komisio, kiun vi devas plenumi, estas pli malfacila. Io okazas tie, en Asirio, kio komencas maltrankviligi mian registaron.

Niaj pastroj rakontas, ke post la norda maro estas piramida monto, ordinare kovrita de verdaj ĉo de la malsupra kaj de neĝo sur la pinto, kaj kiu havas strangajn kutimojn. Post longaj jaroj de l' trankvilo subite ĝi komencas fumiĝi, tremi, brui kaj poste ĝi sputas el si tiom da fluida fajro, kiom da akvo posedas Nilo. Tiu ĉi fajro en kelke da fluejoj rulfalas

sur ĝiaj flankoj kaj ruinigas la laboron de l' terkulturistoj sur grandega spaco.

Mia kara princo, Asirio estas tia monto. Dum tutaj jarcentoj la paco kaj silento regas en ĝi. Sed subite leviga interna ventego, grandaj armeoj elfluas oni ne scias de kie kaj detruas la kvietan najbaradon.

Hodiaŭ apud Ninivo kaj Babelo oni aŭdas boladon: la monto fumiĝas. Vi do devas ekscii, ĉu efektive ĉi tiu fumo antaŭdiras ventegon, kaj trovi antaŭgardajn rimedojn.

—Ĉu mi scios tion fari?... mallaŭte demandis la princo.

—Oni devas elermi rigardi—, diris la faraono. Se vi volas bone ekkoni ion, ne kontentiĝu per la atesto de viaj propraj okuloj, sed certigu al vi la helpon de kelkaj paroj da fremdaj. Ne limigu vin per la juĝo de solaj Egiptanoj, ĉar ĉiu popolo kaj ĉiu homo havas specialan manieron vidi la aferojn kaj ne kaptas la tutan veron. Aŭskultu do, kion pensas pri Asirianoj: Fenicianoj, Ĥetoj, Hebreoj kaj Egiptanoj kaj zorge pesu en via animo, kio komuna estas en iliaj opinioj pri Asirio.

Se ĉiuj diros, ke danĝero iras de Asirio, vi ekscios, ke ĝi iras. Sed se diversaj homoj parolos diversmaniere, ankaŭ tiam maldormu, ĉar la saĝo ordonas antaŭvidi prefere malbonon ol bonon.

—Via alteco parolas, kiel dioj—, murmuretis Ramzes.

—Mi estas maljuna, kaj de la alto de l' trono oni vidas tiajn aferojn, kiujn eĉ ne antaŭsentas simplaj homoj. Se vi demandus la sunon, kion ĝi opinias pri la aferoj de l' mondo, ĝi rakontus ankorau pli interesajn novaĵojn.

—Inter la homoj, kiujn mi devas demandi pri Asirio, vi ne nomis Grekojn intermetis la kronprinco.

—Grekoj!... Grekoj!—, diris li. —Granda estonteco estas rezervita al ĉi tiu popolo. Kompare kun ni ili estas ankorau infanoj, sed kia animo loĝas en ili.

Ĉu vi memoras mian statuon, faritan de greka skulptisto?... Tio estas alia mi mem, vivanta homo!... Mi havis ĝin dum unu monato en mia palaco, sed fine mi donacis ĝin al la templo en Teboj. Ĉu vi kredos: la timo kaptis min, ke ĉi tiu ŝtona mi levigaĵo de sia seĝo kaj postulos duonon de la povo... Kia malordo fariĝus en Egipto!

Grekoj! Ĉu vi vidis la vazojn, kiujn ili fabrikas, la malgrandajn palacojn, kiujn ili konstruas?... El ĉi tiu argilo kaj ŝtono eliĝas io, kio ĝojigas mian maljunecon kaj igas min forgesi la malsanon...

Kaj ilia lingvo... Ho dioj, tio ja estas muziko, skulptado kaj pentrado. Vere mi diras, ke Egipto povus ian mortu kiel homo, Grekoj fariĝus niaj heredantoj. Kaj ili ankorau kredigus al la mondo, ke ĉio ĉi estas ilia verko, kaj ke ni ni neniam ekzistos... Tamen ili estas nur lernintoj de niaj malsuperaj lernejoj, ĉar, kiel vi scias, ni ne havas la rajton instrui al la eksterlanduloj la superajn sciencojn.

—Tamen, patro, vi, ŝajnas al mi, ne konfidas al Grekoj.

—Ĉar tiu estas stranga nacio: oni povas kredi nek al Fenicianoj, nek al Grekoj, Fenicianoj, kiam li volas, vidas kaj diras la veron, la veron firman kiel la egiptaj konstruaĵoj... Sed oni neniam scias, kiam li volas diri la veron. Kaj Greko, simpla kiel infano, li ĉiam parolus vere, sed li ne scias plu tion fari.

Ili vidas la tutan mondon alie ol ni. Antaŭ iliaj strangaj okuloj, ĉio tiel brilas, koloriĝas kaj aliĝas, kiel la ĉielo kaj akvo de Egipto. Ĉu do oni povas konfidi al ilia opinio?

En la tempo de la teba dinastio, malproksime en la nordo, estis urbeto Troja, kiajn ĉe ni oni kalkulas 20,000. Ĉi tiun kokejon atakadis diversaj grekaj vaguloj, kiuj tiel turmentis ĝian nemulnemonbran loĝantaron, ke Trojanoj post dekjara batalado bruligis sian malgrandan citadelon kaj transloĝiĝis en alian lokon.

Ordinara rabista historio!... sed, rigardu, kiajn poemojn Grekoj kantas pri la trojaj bataloj. Ni ridas ĉi tiujn miraklojn kaj heroaĵojn, ĉar nia registaro havas detalan raportojn pri la faktoj. Ni vidas ĉi tiujn frapantajn mensogojn, kaj tamen... ni aŭskultas tiujn ĉi kantojn, kiel la infano aŭskultas la fabelojn de sia vartistino, kaj ni volus aŭdi ilin senĉese!... Tiaj estas Grekoj: mensoguloj de la naskiĝo, sed agrablaj kaj bravaj. Ĉiu el ili prefere oferas la vivon, ol dirus la veron, ne por la profito, kiel Fenicianoj, sed pro bezono de sia animo.

—Kaj kion mi devas pensi pri Fenicianoj?

—Ili estas homoj saĝaj, tre laboremaj kaj kuraĝaj, sed komercistoj; por ili la tuta vivo estas bazita sur la mona profito, se nur ĝi estas granda, kiel eble plej granda! Fenicianoj estas kiel la akvo: ĝi alportas multon, forportas multon kaj penetras ĉien. Oni devas doni al ili plej malmulte kaj antaŭ ĉio sin gardi, ke ili ne eniru Egipton tra fendoj kaŝite.

Se vi bone pagos al ili kaj donos al ili esperon de ankoraŭ pli granda profito, ili estos bonegaj agentoj. Tion, kion ni scias pri la sekretaj movoj en Asirio, ni eksciis per ili.

—Kaj Hebreoj?... murmuretis la princo, mallevente la okulojn.

—Tre inteligenta nacio, sed ili estas malgajaj fanatikoj kaj naskitaj malamiko de Egipto. Nur kiam ili ekcentos sur sia nuko la asirian sandalon, subforĝitan per najloj, ili sin turnos al mi. Ne okazu tio tro malfrue! Sed oni povas uzi ilin... Kompreneble ne ĉi tie, sed en Ninivo kaj Babelo.

La faraono jam estis laca. La princo falis do antaŭ li sur la vizaĝon, kaj ricevinte la patran ĉirkaŭprenon, iris al la patrino.

La reĝino sidis en sia kabineto, teksis maldikan tolon por la vestoj de l' dioj, kaj ŝiaj honoraj servistinoj kudris kaj brodis vestojn, aŭ faris bukedojn. Juna pastro bruligis incenson antaŭ la statuo de Izido.

—Mi venas—, diris la princo por danki vin, patrino, kaj adiaŭi.

La reĝino leviĝis kaj ĉirkaŭprenante lian kolon, diris kun larmoj:

—Kiel vi ŝanĝiĝis?... Vi jam estas viro!... Tiel malofte mi renkontas vin, ke mi povus forgesi viajn trajtojn, se mi ne vidus ilin ĉiam en mia koro. Malbona... Mi tiom da fojoj kun la ministro veturis al via bieno, pensante ke vi fine ĉesos senti vin ofendita, kaj vi alkondukis renkonte al mi vian konkubinon...

—Pardonu... pardonu!... diris Ramzes, kisante la patrino.

La patrino elkondukis lin en ĝardenon, kie kreskis strangaj floroj, kaj kiam ili restis sen atestantoj, ŝi diris:

—Mi estas virino, min interesas do virino kaj patrino. Ĉu vi volas preni ĉi tiun knabino kun vi, en vojaĝon?... Memoru, ke la bruo kaj movado, kiu ĉirkaŭas vin, povas malutili al ŝi kaj al ŝia infano. Por la gravedaj virinoj plej konvenaj estas la silento kaj la trankvilo.

—Ĉu vi parolas pri Sara? demandis Ramzes kun miro. Ŝi estas graveda?... Ŝi nenion diris al mi...

—Eble ŝi hontas, eble ŝi mem ne scias respondis la reĝino...

En ĉiu okazo la vojaĝo...

—Mi tute ne intencas kumpreni ŝin!... elkriis la princo. Sed kial ŝi kaŝas tion de mi... kvazaŭ al la infano ne estus mia?...

—Ne estu suspektema admonis lin la patrino. Tio estas ordinara hontemo de l' junaj knabinoj... Cetere, eble ŝi kaŝis sian staton timante, ke vi forlasos ŝin?...

—Mi ja ne povas preni ŝin en mian kortegon!—, interrompis la princo kun tia malpacieneco, ke la okuloj de la reĝino ekridetis, sed ŝi vualis ilin per siaj longaj okulharoj.

—Ne konvenas tro maldelike forpuŝi virinon, kiu amis vin. Ni ankaŭ, de nia flanko, donos ion al ŝi. La infano de la reĝa sango devas esti bone edukita kaj posedi riĉaĵon.

—Kompreneble respondis Ramzes. Mia unua filo, kvankam li ne posedos la princajn rajtojn, devas esti lokita tiel alte, ke mi ne hontu pro li, kaj ke li ne malbenu min.

Ramzes adiaŭis la patrino kaj volis veturi al Sara; por tiu ĉi celo li revenis en siajn ĉambrojn.

Du sentoj skuus lin: kolero kontraŭ Sara, kiu kaŝis de li la kaŭzon de sia malsano, kaj fiero, ke li estos patro.

Li, patro!... Ĉi tiu titolo donis al li gravecon, kiu kvazaŭ plifortigis lin en liaj altaj oficoj: de l' militestro kaj vic-reĝo. Patro ne estas plu junulo, kiu devas rigardi kun respekto la pli aĝajn homojn.

La princo estis ravita kaj kortuŝita. Li volis vidi Saran, riproĉi ŝin kaj poste ĉirkaŭpreni kaj superŝuti per donacoj.

Sed kiam li revenis en sian parton de l' palaco, li trovis tie du nomarĥojn de Malsupra Egipto, kiuj venis por prezenti al li raportojn pri siaj nomesoj, kaj kiam li estis aŭskultinta ilin, li jam estis laca. Krom tio, li estis akceptonta vespere ĉe si kaj ne volis malfrui.

«Kajree mi ne estos ĉe ŝi», pensis li. «Malfeliĉa knabino, ŝi ne vidis min preskaŭ du dekaĵojn!...»

Li alvokis la Negron.

—Ĉu vi havas la kaĝon, kiun donis al vi Sara, kiam ni salutis lian sanktecon?

—Jes—, respondis la negro.

—Prenu el ĝi unu kolombon kaj ellasu ĝin.

—La kolomboj estas jam manĝitaj.

—Kiu manĝis ilin?...

—Via ekscelenco. Mi diris al la kuiristo, ke la birdoj estas donaco de sinjorino Sara, li do faris el ili rostaĵojn kaj pasteĉojn nur por via ekscelenco.

—La krokodiloj englutu vin!— ekkriis la ĉagrenita princo.

Li alvokis Tutmozikojn kaj senprokraste sendis lin al Sara. Li rakontis al la adjutanto pri la kolomboj kaj diris:

—Portu al ŝi orelingojn kun smeraldoj, braceletojn por la piedoj kaj manoj kaj du talentojn. Diru al ŝi, ke mi koleras, ke ŝi kaŝis de mi sian gravedecon, sed ke mi pardonos ŝin, se la infano estos sana kaj bela. Se naskiĝos filo, mi donos al ŝi duan bienon! finis li ridante. Sed petu ŝin, ke ŝi forigu almenaŭ iom da Hebreoj, kaj akceptu almenaŭ kelke da Egiptanoj kaj Egiptaninoj. Mi ne volas, ke mia filo venu en la mondon en tia societo. Li eble amuziĝos kun hebreaj infanoj, kiuj instruas lin doni al la patro malbonajn daktilojn.

Kajeroj

el la Sud




BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ(HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfnº (00 34) 658
E30080 MURCIA, 166 323
HISPANIO

Retskribu al
jesuo@ono.com

<http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k71.html>

<http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k71.html>



Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.
ISSN-1697-6460